

NIA VOĈO

Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde ekde la 18.30h en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eliras Lupe Sanz

APRIL 1998

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo: <http://www.ciudadfutura.com/esperanto>

LICEO TRANSLOKIĜIS

Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h, ĉe HEF, RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79. Jam ne funkcias nia sidejo en Atocha.

La adreso de San Alejandro nur estos por poŝtaj kaj oficialaj aferoj. (La direcció de San Alejandro sólo debe ser usada para el correo y asuntos oficiales).

ESPERANTO EN "INTERNET"

Hungara gazeto "Eventoj":	ftp.hungary.net/pub/esperanto
Asocio Monda Turismo:	www.bydg.pdi.net/~turismo
Akademio Internacia de Sciencoj San Marino:	www.unipader-born.de/extern/fb/2/AIS/ais.html
Grupo de Esperanto (La Laguna) Tenerife:	www.arrakis.es/~fjdavila
Kataluna Esperanto Asocio	www.stel.net/esperanto/kea
Asoc. Esperantaj Radio-Amatoroj	members.aol.com/OSIEK/AERA
Sennancienca Asocio Tutmonde	www.worldnet.net/~sat-esp (sat-esp@world-net)
Kalendaro de E-aranĝoj	www.hungary.net/esperanto
Fladra Esperanto Ligo (Libroservo)	esperanto.agoranet.be/retbutik
Esperanto sub la Suda Kruco	www.geocities.com/Athens/Acropolis/5541
Esperanto Asocio de Britio	www.esperanto.demon.com.uk.org.uk
Estona Radio (E-radioelsendo)	www.er.ee/tallinn

En la paĝo de Andaluzia E-Unuiĝo (www.ciudadfutura.com/esperanto) vi trovos lastajn numerojn de "Gazeto Andaluzia", "Monate ĉe vi" kaj "Nia voĉo". Ankaŭ vi trovos ligojn al Jura Tribuno Internacia, revuo "Esperanto sub la Suda Kruco"

EKSTERLANDE

UEA estis reprezentita en la kunsido de la Eŭropa Konsilio pri Lingvoj, okazinta en Lille (Francio) 117 eŭroparlamentanoj estas pretaj konsideri esperanton kiel helpilo al la solvado de la lingva problemo en la Eŭropa Unio.

HISPANIO

Inter la 25-a de aprilo kaj la 2-a de majo TEJO seminarios en **Vitoria-Gasteiz** pri "Homaj rajtoj sub premo". Seminarianoj sub 30 jaroj povos diskuti kaj spertiĝi, kun la helpo de fakuloj, pri la 50-jariĝanta Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj, pri la praktika universaleco de homaj rajtoj, pri rajtoj de etnaj kaj alispecaj minoritatoj ktp. Pro la subteno de Eŭropa Junulara Fondaĵo de Konsilio de Eŭropo la partoprenkotizoj estas tre favoraj kaj oni ricevos 50% de la vojaĝkostoj.

Valencia E-Grupo inaŭguris la novan sidejon tute renovigita kaj farbita pere de membroj de la asocio. Al la inaŭgurfesto venis membroj kiuj de longe ne kontaktis kun VEG. S-roj Sempere, Alonso, Cabezas kaj Casquero salutis kaj paroladis. Multaj E-grupoj sendis bondezirojn al VEG en sia nova sidejo. Post la akto okazis bankedo.

E-KURSO EN UNIVERSITATO

En Valencia sukcese okazis E-kurso en la Fakultato pri Filologio. Unuafoje en Hispanio la kurso de esperanto havis akademian valoron (2 kreditoj). Aligis preskaŭ 100 uloj sed nur 60 povis ĉeesti pro sidlokaj problemoj. Oni faris liston por la venonta lernojaro kiam ni esperas atingi pli grandan klasĉambron. La profesoro estis A. Casquero kaj Berta Raposo estis la direktorino de la kurso. Antonio Alonso kaj Miguel Fernández prelegis en la inaŭguro kaj fermo de la kurso.

HEF ANGULO

Rilate **Kampanjo-2000** HEF celas: almenaŭ 10%-e pligrandigi sian membraron; reaktivigi la landajn sekciojn de TEJO kaj ILEI; uzi la novan hispanlingvan informlibreton *Pro Esperanto* kaj kreadi informilon triptikforman por prezenti Esperanton (ekz. en la Madrida lingvofoiro Expolingua, verŝajne en 1999); disdoni almenaŭ 5000 informilojn ĉiujare. (Esperanto 2/98/)

Lunde kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 80 79

57a HEF Kongreso. 1-3a majo. Valladolid.

La tria fojo en la historio de la hispanaj kongresoj de esperanto, Valladolid gastigos nin en la unuaj tagoj de Majo. Ĉu vi jam aliĝis?.

Kongresejo: Centro Cívico El Campillo

ESPERANTO EN AMAS-KOMUNIKILOJ

Pere de Cesar de Mosteyrín en la revuo "Tierra, mar y aire" (Enero-febrero 1998) aperis novaĵon pri la esperanta nova teksto de la meso kaj pri la Patronino de esperantistoj, la Virgulino de la Espero kiun festas Eklezio la 18-an de decembro.

La Prezidanto de la Konfederacio de Entreprenistoj de Córdoba apogis Esperanton kiel internacia helpa lingvo (Diario de Córdoba, 5 febrero 1998)

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

**Memoru ke ni kunvenas lunde je la 18.30h en
RODRIGUEZ SAN PEDRO 13-3º7**

Kursoj:

Centro Cultural "Maestro Alonso" (kvartalo Ventas). Merkrede 18.30 ĝis 20.00.

Centro de Dña Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18

HEF-CO. Koresponda kurso

Prelego: 13-an aprilo. "Modernismo en Barcelono" (Lumbildoj)

11-an de majo, lunde, okazos prezetadon de pup-teatro pere de nia japana samideanino Krizantemo, je la 19.00 h en Centro Cultural Galileo. Strato Fernando el Católico. Aŭspicias la Japana Ambasadejo

KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

9-a Kongreso de Valencia kaj Murcio. Okazos en Castellón, 4-5 aprilo. Tel. 964 203238. S-ro Conejero

57-a Hispana Esperanto Kongreso. Valladolid 1-3 majo

50-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. 16-22a majo 1998. Aalborg (Danio) 83-a

UK Montpeliero (Francio). 1-a ĝis 8-a de aŭgusto

84-a UK Berlino (Germanio). 1-a ĝis 8-a de aŭgusto 1999


ESPERANTO LICEO DE MADRID

San Alejandro 6-4ºB.Ext

28005 Madrid

Asociación de Utilidad Pública Municipal

Recenzo



Kliŝdetruo trompe tradicia


Ekstremoj. Novelaro. Miguel Fernández, Jorge Camacho, Gonçalo Neves, Liven Dek. Vieno: Internacia E-Muzeo, 1997. 207p. 23cm. 27,00 gld.

Literaturo estas pionira esplorado laŭ la landlimoj de la homa sperto; kaj samtempe ĝi estas *plilarĝigo* de tiuj limoj. Verkoj kiuj restas cis la rando de la abismo kaj ne kuraĝas transsalti kutimajn ideojn kaj moralajn antaŭjuĝojn, ne rajtas ambiĉii la titolon de literaturaj verkoj; eĉ kiam verkisto ŝajne partoprenas kun intima konvinkigo en la valor-sistemo de sia socio — kiel ekz. Stifter, aŭ ankaŭ Proust —, tamen ekzistas almenaŭ *unu* flanko de lia verko (ĉu la lingvaĵo, ĉu la psikologia introspekto) kiun oni povas difini ekstremisma. Literaturo oni legas por renversi sian mondkoncepton, ne por konfirmi ĝin; iamaniere, por eksperimenti ĉu ankoraŭ ekzistas en ni antaŭjuĝoj kiujn neniel pravigas la realo. Kiel dirus Kafka, libro devas esti “hakilo por la glacia maro en nia interno”.

Guste tiuj ekstremoj fariĝas ĉeftemo en ĉi tiu proza verko de la “ibera skolo”, kiu jam produktis la poezian eventon de la lastaj jaroj, nome la kolektivitan poemaron *Ibere libere*. En ĉi tiuj prozaĵoj, kiel en tiuj poemoj, la aŭtoroj instinkte manipulas kusan literaturon, kiu intence luktas kontraŭ la leganto kaj provas dementi liajn atendojn kaj senbazajn konvinkojn. La novela formo plej taŭgas por tiu kritike kliŝdetrua tasko, ĉar en trompe tradicia kadro kaj per fulmrapida fina renverso de la rakonto novelisto povas plej efike evidenti la iluzion stabilecon de nia plej baza pensrutino kaj ties kompletan mankon de realaj fundamentoj.

La aprioraĵoj kiujn la iberaj ekstremisme celis renversi, koncernas ĉefe la burĝan moralon. Kiel konate, burĝo postulas *nerektan* rilaton al la vivo; ĉio kio tuŝas lin kiel simple naturan kaj ne kulturalan estaĵon — do antaŭ ĉio sekso kaj morto — estas al li fremda

kaj malamika. Sekve, la temoj de ĉi tiu esence kontraŭburĝa novelaro rilatas ĝuste al sekso (malfidelo, unua amora sperto, seksa memkontentigo), al morto (sinmortigo, venĝo) aŭ al



La “ekstremistoj”. Horloĝ-direkte, de supre maldekstre: Jorge Camacho, Gonçalo Neves, Miguel Fernández kaj Liven Dek.

ambaŭ (amo trans morto, aidoso); nur la temfadeno “toleremo” ŝajne rilatas al neniu el la du: temas ĉi-kaze pri ekstremismo pli vastasence politika.

Konkorde pri la komuna temaro, ĉiu kunlaboranto procedis laŭ sia individua stilo; tiu “diverseco en konkordo” estas malofaĵo en la E-literaturo.

Fernández — kies lingva kaj poezia eminento pruvigis ankaŭ en lia poemaro *El miaj sonoraj soloj* — estas literature pli tradicia ol liaj kolegoj, sed tre avangarda el la lingva vidpunkto; ĉe li la protagonistemaĉo de pasintaj spertoj stompigas en komparo kun la aktualaj emocioj. Guste tiu intertuŝo de diversaj tempaj niveloj, kiel en “Londona uverturo”, povas deŝiri nin

de la rutino kaj puŝi nin al la rando de niaj spertoj; aŭ, per alia tekniko en “Kolonelo Sanz”, akra socia kritiko samlokas kun elegia defendo de kamaradeco kaj toleremo; aŭ, en “Alba”, kunfandiĝas rememoroj pri la plej altaj romantismaj tradicioj.

Camacho same jonglas per la lingvo, sed li ŝpinas siajn rakontojn certe malpli romantisme ol Fernández, kaj lia ekstremismo aperas kiel klerisma ciniko, kiu amuzite, kvankam inteligente kaj sentive, priskribas la kapriolojn de la novela intrigo. Akre cinikaj rimarkoj eĉ paradus unuavice, dum la rakonto disvolviĝas iel postkulise; laŭ vere profesia literatura tekniko, ĉe Camacho la intrigo nevideble kernas sub la plektaĵo de rememoroj, priskriboj, konsideroj. Kaj foje — en “Avataro”, ekzemple — tiuj lingvaj rumoroj, ŝajne tiom malproksimaj de “tradicia” rakonto, subite ekharmonias kaj soras al poeziaj akutoj.


Similan lertecon en la konstruado kun fina renverso — ekz. en “Litomiksa tombejo” — montras Gonçalo Neves, kies kontribuo (nur 16 paĝoj) tamen estas bedaŭrinde pli malvasta ol tiuj de la aliaj tri. Sed ĉefe en la noveloj de Liven Dek oni trovas eksterordinaran kapablon konstrui rakontajn mekanismojn kiujn oni ĝuas kun granda amuziĝo. Legu ekzemple “Rendevuo”, kaj nur ĉe la lasta frazo vi komprenos la komencan; similan atendon pri la disvolviĝo kreas la unua frazo de “Marta kaj Maria”, kvankam kun pli da patoso kaj homa komprenemo.

Fine: kvankam ĉi tiu novelaro estas verkita en altnivela literatura lingvo, ĝi neniel kontraŭas la fundamentan lingvouzon, neologismoj aŭ maloftaj vortoj ĉiam havas artan pravigon, kaj malfacilecon kompensas la seninterrompa artisma streĉo de la rakontado. La stilo do estas bela pruvo ke povas ekzisti esprimiva literatura Esperanto, kiu ja diferencas de la ĉiutaga lingvo kaj tamen estas daŭre pravigebla surbaze de sia arta kohero kaj senmakula fundamenteco. Multaj diletantoj, kiuj mistraktas Esperanton kiel ludilon por siaj neologismaj kaj eĉ nur lingve eraraj eksperimentoj, devus lerni el ĉi tiu volumo la strebon al inteligenta, ne amatora literaturo.

Mauro Nervi (Italio)

Jorge Camacho

KASTELO INTER BURNOJ



al William Auld,
admire kaj amike

1

En belo de la kampo ĝia nomo
sonoras grize: Tristo. La kastelo
atendas lin kun roka pacienco.
En hela fruvespero li ascendas
la kurban vojon al la ŝtona Tristo.
Naskiĝe ni ricevas vivon turban
en daŭro kaj intenso. Li feliĉe
kontemplas nun la vojon ĝistiaman;
li ĝojas (la arbaro ekprintempas)
kaj rememoras: li oficis kiel
piloto spita kaj mentoro, seme.
Sed oni tiun turnon en la danco
ne konas, kaj preferas ĝin ne koni.
Per sola vorto ĉiuj lin resumas:
Poeto, kaj la iro farandola
aspektas nun parado al Parnaso.
Nur vivo bunta fajran diron plektas.
Li vidas la kastelon sur la supro
de l' monto. La krenela Tristo sidas
obstine inter du silentaj burnoj
vokantaj la poeton mandoline.
Poeto sen medio ne ekzistas.
Senkosma homo estas amuleto
sur vasto brusta de kadavro vana.
Genio evoluas el kontrasto.
En li poeti montras la kulminon
de senso kaj estezo: supla lipo

knabina, kiu iam lin salutis
karese kaj leĝere; la fascina
muziko voĉa de infana klaso
sur korto pralerneja; meĥaniko
oprese prava en fabrik' glasgova
aŭ en atak' armea; la surprize
agrablaj gustoj de porci' budena,
rabarba torto, gluto da viskio
(viviga akvo de la lando alba);
la onomatopoej de petolaj
boreoj kaj severaj akvilonoj;
la korvaj flugilbatoj kriptaj pendaj
super konsekraj nekropoloj torfaj;
sakŝalma huo, veo kaj hurao,
aŭ fulmosagoj tra la nokto kalma;
la skota kardo - en pejzaĝ' viola -
kaj Tristo - en astempo miozota.
Ĉi ĉio lin akuŝis, modlis, skulptis
konforme al hazard-kosmogonio.
Teksturo kosma lin karakterizas,
dominas liajn jarojn klaroskuro
kaj tamen sortofratojn li malhavas.
Fatalo distribuas nin malsamen
sen plano kaj sen celo, sur tabulon,
kaj ĉiu peco estas solinfano
unika: saĝa reĝo, rudimenta
peon' aŭ kuriero lunatika.
Eĉ du peonoj samaj ne ekzistas;
se unu ruzas, dua penas dupe.
Ĝemelaj vivoj trompas, ĉar ĝemeloj
montriĝas nur sozie paralelaj
simile al la burnoj ĉirkaŭ Tristo.

2

Medio sen poeto ne ekzistas.
Senhoma kosmo estas fantazio
bastarda, kaj koŝmaro infinita.
Ĝenio, ĝino, demiurgo arda,
esploro kaj inspire li modulas
la mondon ĉirkaŭ sin, imperatore.
Esprimoj, gestoj, movoj mem sufiĉas
por kreo de abismoj kaj landlimoj;
de best' en natur-kaĝo; de blizardo;
de homo, kiu drivas sia-nesten;
por kreo de muziko, kiu lulas
la koksojn harmoniajn de almeo.
Impetas la poeto Tristo-cele
la metrojn lastajn, kaj senlace tretas
la grundon sur la vojo alkastela.
Nur vido fajna teksas viv-abundon.

3

Arĝento kun arĝento kamaradas
sur kastelkorto. Sub la firmamento
enspiras la poeto pulmo-nutre.
Sub arko kaj blazono li transiras.
Nokturno flustras la lontan fluron
de nova roĝo apud juna burno.
Fantomoj akvaj en la sin' arbara:
Morno kaj Zorgo estas ties nomoj.

burno: [el *La infana raso*] roĝo.